GRUPO ESPERANTISTA

# "FIDO KAJ ESPERO"

VALLADOLID

**Noviembre-Diciembre**

**Año 2007** **Nº 229**

**Dirección Postal:** Apartado, 119; 47080 VALLADOLID
Adherido a la Federación Española de Esperanto

# Editorial

Una vez más, estamos en el final de un año, en el que, si nos limitamos al campo esperantista, no se han logrado las perspectivas e ilusiones que teníamos al comenzar el año. No obstante, vemos con ilusión y alegría, que sí el entusiasmo por el idioma iniciado por el oculista polaco **Dr. Zamenhof** está, lamentablemente, en un período de crísis en nuestra Ciudad, no es menos cierto que en otras ciudades, tanto de España como del extranjero, el interés, no sólo no ha decrecido, sino que está en aumento.

Cuando en años, ya relativamente lejanos, celebrabamos con alegría y en un ambiente de fraternal camaradería los diversos actos, lúdicos, recreativos, culturales e incluso religiosos, para homenajear al **Dr. Zamenhof**, no podíamos pensar que esa ilusión de aquellos años, se convirtiese en la apatía y la desidia que, en mayor o menor grado, a todos nos embarga.

Cierto es que las actuales circunstancias, no son, ni mucho menos, las que entonces había y no podemos olvidar que las ofertas culturales existentes, tanto de pago como gratuitas, son de tipo muy diverso y que están al alcance de todos.

Ante la llegada de un nuevo año, sería de desear que todos y cada uno recobremos, al menos en parte, el interés y el entusiasmo que teníamos por el Esperanto.




Okaze de la centjariĝo de **Universala Esperanto Asocio**, konata inter la tutmonda esperantistaro kiel **UEA**, venontjare, la Universala Kongreso de Esperanto havos kiel sidejon la nederlandan urbon **Roterdamo**, kiu estas la dua plej granda *urbo* en *Nederlando* en la provinco de *Suda Holando* kaj havas ĉ. 600 000 enloĝantojn., ĉar en ĝi situas la Centra Oficejo de UEA kaj estas ĝia stabo kiu, rekte, organizas ĝin.

La urbo estas tutmonde konata pro la humanisto *Erasmo* de Roterdamo kaj la tre granda haveno (la plej granda en *Eŭropo* kaj antaŭe la plej granda en la mondo).

En *1230* Roterdamo fondiĝis. La nomo *Rotterdam* signifas "akvobaron de *Rotte*". "Rotte" estas la nomo de unu el la du riveroj, apud kiu la urbo kreskas.

Al Roterdamo donis *urbajn rajtojn* *Wilhemo la 4-a de Holando* je la *7-a de junio* *1340*.

En *1872* konstruiĝis la *Nieuwe Waterweg* ("Nova Akvovojo"), larĝa *kanalo* inter Roterdamo kaj la *Norda Maro*.

La *14-an de majo* *1940* bombis Roterdamon la *germana* aerarmeo dum la lasta el kvin tagoj de milito en Nederlando. La kerno de la urbo estis preskaŭ tute detruita, kion la artisto *Ossip Zadkine* poste esprimis per sia statuo *Urbo sen Koro*. La statuo troviĝas en la norda parto de la urbo.


Por la UK estis elektita kiel kongresa temo "Lingvoj, trezoro de la homaro, ĉar dum la venonta jaro, oni celebros la Internacia Jaro de Lingvoj, proklamita fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj.

Ankaŭ en la agadplano de HEF por la venonta jaro, la Internacia Jaro de Lingvoj ludos specialan rolon, ĉar, ne vane, kiel diras la Direktoro de UNESKO en sia mesaĝo: "*La lingvoj fakte estas nepraj por la identeco de la homaj grupoj kaj individuoj kaj por ilia paca kunekzisto. Ili estas strategia faktoro por antaŭeniri al daŭropova evoluigo kaj harmonia rilato inter la tutmonda kaj la loka.*

Pro, se hazarde, unu el la legantoj de nia bulteno intencas partopreni la U-K-on, jen la kongreskotizoj por esperantistoj loĝantaj en Hispanio, ĝis la fino de la jaro

| | |
|---|---|
| individua membro de UEA (ne inkluzivas MG): | 160 € |
| ne individua membro de UEA | 200 € |
| kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA | 80 € |
| kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA | 120 € |

# Cuenca, historia



Su primitivo nombre se baraja entre *Anitorgis*, *Sucro* y *Concava*, aunque no hay ningún rastro fiable que lo pruebe.
Se ha afirmado que por las tierras de Cuenca pasaron los concanos y también es posible que los lobetanos, habitaran aquí, fusionándose con los celtíberos citeriores formando un pueblo mixto.

Con la llegada del islam, se comenzó a hablar de Cuenca como un centro urbano consolidado, llegando a tener fama en Al Andalus

Los musulmanes construyeron una inexpugnable fortaleza, probablemente llamada *Conca*, en lo alto de la atalaya para controlar los accesos a la Serranía, y protegida por las rocas de las hoces que hacían de muralla. Con el tiempo, la población aumentó y se ampliaron las murallas, llegando a tener un millar de habitantes. En lo que hoy es la Plaza de Mangana estaba el *Alcázar*, la *zona de comerciantes y artesanos* se centraba en la actual Plaza Mayor y la *Mezquita* estaba en la actual Catedral.

Alfonso VIII sitió la ciudad durante nueve meses hasta que al final consiguió agotar a sus habitantes por el hambre o con proyectiles. Siendo el ***21 de Septiembre de 1177, festividad de San Mateo***, el día que Alfonso VIII entró y pisó Cuenca. Tras la conquista, Cuenca aumentó su población muy rápido, constituyéndose en ella un *concejo* y una *sede episcopal*; siendo *Juan Yañez* el primer Obispo de Cuenca elegido en 1182. El concejo se rigió por el Fuero de Cuenca, considerado por los juristas como uno de los más perfectos

Una vez conquistada Cuenca, no tardaría en cambiar su aspecto urbanístico: los musulmanes quedaron relegados a su barrio, la zona de Mangana, donde conservaron una mezquita; los judíos, ocuparon la calle de Zapaterías. El resto fue ocupado por los cristianos. La vida se desarrolló en torno a la Plaza Mayor, alrededor de la cual se tejía un entramado de callejuelas y rincones donde se alternaban casas, talleres de artesanos y tiendas de mercaderes. La muralla que rodeaba Cuenca disponía de seis puertas y tres portillos.. Sobre la muralla se construyeron varias iglesias como la de San Miguel y San Juan en la parte del Júcar.

Durante la Guerra de Sucesión la ciudad apoyó a la causa de Felipe V, quién recompensó a sus ciudadanos añadiéndose el título de Fidelísima y posteriormente, el de Heroica, alos de Muy Noble y Muy Leal, que ya ostentaba la ciudad. En el siglo XIX queda consituida la ciudad actual, siendo la calle Alfonso VIII su principal vía que comunica con la Plaza Mayor y la hoz del Huécar como la frontera entre las dos zonas de Cuenca.

La parte alta de la ciudad deja de ser la arteria principal, dejando paso a la parte baja como centro económico y social. Con la calle Carretería como centro urbano, administrativo y burocrático de la ciudad. La parte alta alberga actualmente la Universidad de Castilla-La Mancha, Universidad Menéndez Pelayo, Archivo Histórico, Parador de Turismo, Ayuntamiento y de reciente creación, el Museo de la Ciencias.

La ciudad de Cuenca ha sido declarada **Patrimonio de la Humanidad.**

# Tra la mondo


## La Ĝenerala Direktoro de UEA veturos al Moskvo

La ĝenerala direktoro de UEA planas veturi al Moskvo printempe de 2008 por surloke esplori la kondiĉojn por eventuala Universala Kongreso en Rusio en la proksimaj jaroj. Tiun informon ricevis Andrej Grigorjevskij, la prezidanto de Rusia Esperanto-Unio, kiu dum la Malferma Tago en la Centra Oficejo klopodis varbi subtenon por la ideo kongresi en Moskvo en 2010. En Moskvo Osmo Buller laŭplane renkontos reprezentantojn de la urba registaro.




Por diskonigi la ideon pri Universala Kongreso en Moskvo, iniciata grupo de kelkaj rusiaj Esperanto-organizaĵoj produktis koloran faldfolion kun la titolo *Bonvenon al Moskvo por Universala Kongreso - ĉu jam en 2010?*

Kelkdek ekzempleroj de la broŝuro estis disdonitaj al estraranoj de UEA kaj aliaj ĉeestantoj dum la Malferma Tago, kaj Rusia Esperanto-Unio planas dissendi la restantajn kelkcent ekzemplerojn al diversaj internaciaj Esperanto-renkontiĝoj, kiuj okazos dum la proksimaj monatoj. Laŭ la broŝuro, nun estas la ĝusta momento viziti Moskvon.




De la 12a ĝis la 18a de julio 2008, Montrealo ricevos la 7an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto, kiun ĉeestos esperantistoj el la Amerikoj, kaj eĉ ekster la kontinento.

TAKE estas kongreso kiu okazas ĉiun trian jaron, starigita de la Amerika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio. La ĉi-kongresa temo estas : « **Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj : diverseco por daŭropova evoluigo en la Amerikoj** ». Estos planitaj prelegoj pri tiu temo. Krom tio estos, interalie, spektakloj, ekskursoj tra la urbo, kaj bankedo. Samtempe kun TAKE, okazos la jara renkontiĝo de Esperanto-USA. Ni esperas bonvenigi inter 100 kaj 200 partoprenantoj.

## LINGVA FESTIVALO LEUVEN


La 23 an februaro, okazos en la belga urbo Leuven (Lovaina ) **LINGVA FESTIVALO**, En sabata posttagmezo diversaj homoj prezentos **en la nederlanda** dum, proksimume unu horo, sian lingvon.
Okazos tema ekspozicio en multaj malsamaj lingvoj kaj ankaŭ pri la prezentataj lingvoj mem diversaj informoj estos montrataj. La temo por ĉi tiu unua eldono estas: "Fabeloj en la UN-Jaro de la Lingvoj".
Tiu ĉi Lingva Festivalo sin direktas al ĉiu kiu havas specialan intereson pri lingvoj.
Ĝi iĝos dujare revenanta evento.

# Humoro

Marido y Mujer

Después de medio siglo de matrimonio, él muere, y al poco tiempo, también ella va a parar al cielo...
En el cielo, encuentra al marido y corre hasta donde él y le dice:
- ¡Queriiidoooooo! ¡Que alegría encontrarte!
Y él responde:
- ¡No me vengas con tonterías! El trato fue: "HASTA QUE LA MUERTE NOS SEPARE"






## Viajera Preocupada

Hay una turbulencia en el avión por lo cual una señora se espant
y le pregunta a la auxiliar de vuelo:
Señorita, en caso de que caigamos, ¿hay algo que nos detenga?
Y contesta: Sí, el suelo.

## Problemo dum flugo

En aeroplano oni anoncas per interna komunikilo:
- Ĉu estas kuracisto inter pasaĝeroj?
Unu viro stariĝas kaj iras en pilotejon.
Post iom da tempo nova anonco:
- Ĉu estas inter pasaĝeroj piloto?






**Konvena Vartistino**

Virino dungas novan vartistinon.
- Pro kio oni maldungis vin en antaŭa laborloko?
- Mi forgesis bani la infanon.
La gaja infana voĉo el infanĉambro:
- Panjo, ŝi taŭgas por ni!

## Bona difino

Kio estas optimismo?
Nu, unue tio estas manko de informo.

## Jarfinaj kaj Novjaraj Bondeziroj



Okaze de la Kristnaskfestoj kaj la fino de la nuna jaro 2007 kaj la alveno de la venonta 2008, pere de tiu ĉi bulteneto, ni deziras al ĉiuj legantoj, enlande kaj eksterlande, ***Pacon, Sanon kaj Prosperon.***

Ke dum 2008 realiĝu ĉion kion vi dezirus kaj ke en la esperanta kampo, ni estu konsciaj pri la valoro de la lingvo kaj de la interna ideo sur loka, regiona, nacia kaj eĉ internacia nivelo.

PERIÓDICO

GRUPO ESPERANTISTA
Apartado, 119
47080 VALLADOLID